

R.A.D.E. INFORMILO

ROTARIA AMIKARO DE ESPERANTO



Numero 39

Junio 2018

Nia fama **MARC LEVIN**, honora membro de RADE en Francio, unuaranga esperantisto kaj pioniro rilate la agadon de Esperanto en Rotary post la dua mondmilito, forlasis nian mondon en marto. Ni esprimas nian sinceran malĝojon pro lia forpaso al liaj familianoj kaj geamikoj en Lyon, Francio. Kvankam lia alta aĝo, li ankoraŭ deĵoris firme dum la Rotary monda konferenco en Lisbono en 2015 kune kun Ronald Glossop kaj aliaj esperantistoj.

Jen la traduko de la respektsaluto, kiun donis al li la franca rotaria revuo "Le Rotarien".

"Marc Levin estas eksĉefredaktoro de la revuo "Le Rotarien". Neniu konis pli bone la rotarian movadon en Francio. Kiel eldonisto li helpis sian patron "Richard" ekde la kvindekaj jaroj por publikigi modestan bultenon, kiu iĝos la magazino de la francparolantaj rotarianoj. Kiel ĉefredaktoro li postvenis sian patron tro frue mortita en la jaro 1969. Li pasiigis pri Afriko kaj organizis multajn renkontojn kun afrikaj rotarianoj kun kiuj li kreis profundajn personajn amikajn ligilojn. Do la monata revuo "Le Rotarien" iĝis la ĉefa revuo de la francparolantaj afrikanoj.

Kiel arda esperantisto, li komunikis sian pasion al multaj rotarianoj. Dum 23 jaroj, kiel ĉefredaktisto de "Le Rotarien", li kolektis siajn spertojn en la libro "Historio kaj historietoj de Rotary". Tiu libro estas rezulto de 65 jaraj pripensadoj kaj atestoj.

Jaraĝa de 91 jaroj, li forlasis nin ĝuste kiam li pretis celebri la 50 jarajn fidelajn prezencojn en la klubo de Lyon, kiun li prezidis.

Granda atestanto de Rotary malaperis.

leRotarien
L'actualité en ligne du Rotary



ACTU ROTARY

LE MAG

EN DIRECT DES CLUBS ET DISTRICTS

Actu Rotary > Actualité et Société > MARC LEVIN, ANCIEN RÉDACTEUR EN CHEF DU ROTARIEN

MARC LEVIN, ANCIEN RÉDACTEUR EN CHEF DU ROTARIEN

01/06/2018



MARC LEVIN,

ANCIEN RÉDACTEUR EN CHEF DU *ROTARIEN*

Nul ne connaissait mieux le Rotary en France que Marc Levin. Éditeur, il avait assisté son père Richard dès les années 1950 pour la publication d'un modeste bulletin qui allait devenir le magazine des Rotariens de langue française. Il succéda à son père décédé prématurément en 1969 comme rédacteur en chef ; passionné par l'Afrique, il entreprit nombre de rencontres avec des Rotariens de ce continent, tissant des liens personnels profonds, ce qui fit du mensuel l'organe de presse de la majorité des Rotariens francophones du monde.

Fervent adepte de l'esperanto, il vécut cette autre passion y compris à travers ses nombreux contacts rotariens. Rédacteur en chef du *Rotarien* durant 23 ans, il rassembla ses connaissances dans l'ouvrage *Histoire et histoires du Rotary*, fruit de 65 ans de réflexions et de témoignages.

Marc nous a quittés le 18 mai à l'âge de 91 ans ; il était sur le point de célébrer son demi-siècle de fidélité au Rotary club de Lyon, dont il fut président.

Un grand témoin du Rotary disparaît.

Marc Levin estis ankaŭ la kreinto de la unua retpaĝo pri RADE



En la revuo Esperanto (julio-augusto 2018) oni povas legi ...

Forpasoj

Marc Levin (11.02.1927 – 18.05.2018)

Marc Levin 91 jaraĝa forpasis la 18-an de majo en sia hejmo. La funebra ceremonio okazis la 25-an de majo en la preĝejo St. François d'Assise en Lyon. Marc Levin konis Esperanton de sia juneco, ĉar lia patro Richard jam estis agema siatempe ĉu loke ĉu regione. Fakdelegito de UEA en Lyon, estis vicprezidanto de CERL kaj ankaŭ Prezidanto de Rodanalpa Federacio. Li okupiĝis pri la organizado de la tutlanda kongreso de Esperanto-France en Villeurbanne en 1996 kaj foje respondecis pri Esperanto-staĝoj en Lyon. Li estis sekretario ĉe RADE (Rotaria Amikaro de Esperantistoj) tutmonde. Li aperigis plurajn artikolojn en la revuo «Le Rotarien».

Plej lasta informo de la nova Rotary e-klubo Esperanto Brasil !

Tradicie ĉiujare la estraranoj en R.I. je ĉiuj niveloj, transdonas solene siajn oficojn al nova estraro. Tia festa evento havos por la plej nova Rotary Klubo de esperantistoj specialan lokon.

La guberniestro de la Distrikto 1960, Lisbono, Portugalio, kune kun la nova klubprezidanto de la Rotary Klubo *Lisboa Norte* invitas la membrojn de la brazila Esperanto Rotary Klubo realigi sian ceremonion kaj komunan vespermanĝon la 1-an de aŭgusto en Lisbono. Ni antaŭvidas la partoprenon de almenaŭ 12 membroj de la 25 de la propra Klubo kaj invitas la rotarianojn, membroj de RADE, ĉeestataj en la UK ankaŭ partopreni.

Dum la movada foiro, la sabaton 28-a julio, 19-a horo en la kongresejo, funkcios tablo de RADE, kie vi povas enskribiĝi por la festo kaj ricevi informilon.



En la revuo Esperanto (Julio-Augusto 2018) Nicolas Minnaja skribis interesan recenzon pri la libro “Alirvojoj al Esperanto”. Li ne forgesis mencii la alvokigxon de la rotaria movado por la paco.

Dankon Nicolas.

Recenzo

Alirvojoj al Esperanto: ĉu sufiĉe, ĉu tro?

■ Nicola Minnaja

15 diversaj aŭtoroj. Ĉefred. Christer Oscar Kiselman. *Alirvoj al Esperanto*. Eseoĵ. Kava-Peĉ. Dobřichovice, 2018. 229 p. Prezo ĉe UEA: 16,20 €

La ĉeĥa eldonejo Kava-Peĉ per nova libro celas konduki la legantojn en la mondon de Esperanto (kelkaj ĝin

por la proksimigo de la popoloj de la mondo respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko”. Tonkin ankaŭ memorigas, ke paradokse iu rilato inter Esperanto kaj la ekstera mondo estas konstata de la fakto, ke kelkaj reĝimoj vidis en ĝi danĝeron kaj ĝin persekutis. Estas ankaŭ citite, ke pluraj esperantistoj la-

de kelkmilo da personoj: kelkdeko da esperantistoj partoprenas kun siaj flagoj kaj montras portretojn de pioniroj de la pacmovadoj, inter kiuj Zamenhof. En Rotario, kiu havas “gvidlinion” por solvo de konfliktoj, ekzistas Rotaria Klubo Esperanto en Brazilo kaj sekcio Rotaria Amikaro de Esperanto.

Por resti ĉe ideologio, en la ĉapit-

